Дмитрий Николаевич Садовников,

# Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)

1. Из-за острова на стрежень,
На простор речной волны,
Выплывают расписные,
Острогрудые челны.

2. На переднем Стенька Разин,
Обнявшись, сидит с княжной,
Свадьбу новую справляет,
Сам веселый и хмельной.

3. А она, потупив очи,
Ни жива и ни мертва,
Молча слушает хмельные
Атамановы слова.

4. Позади их слышен ропот:
- Нас на бабу променял!
Только ночь с ней провозилс
Сам наутро бабой стал .

. . .

Дмитрий Николаевич Садовников,

# Volga, Volga (Stenjka Rasin)

*tradukita de Kristian Langgaard*

De malantaŭ la insulo
sur la ondoj de l' river'
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer'.

Sur l' antaŭa Stenjka Razin;
festas la edziĝon li
al princino el Persujo
en varmega amebri'.

Sed la viroj murmuregas:
“Tute li forgesis nin.
Nin virino anstataŭos.
Li fariĝis mem virin”’

Tiun mokon aŭdas Stenjka,
la terura ataman'.
Ĉirkaŭbrakas la persinon
li per sia forta man'.

. . .

Дмитрий Николаевич Садовников,

# Stenka Rasin

*tradukita de N. N. 21*

In den Wellen hinter Inseln
Ziehen Kähne malerisch, -
|: Fangen leis an aufzuwachen,
Bang ist jedes Angesicht. :|

Stenka Rasin vorn als erster,
Selig in der Trunkenheit,
|: Hält im Arme die Prinzessin,
Die er eben erst befreit. :|

.................................................
.................................................
.................................................
.................................................

.................................................
.................................................
.................................................
.................................................

. . .

Дмитрий Николаевич Садовников,

# Sten’ka Razin

*tradukita de Frieder Weigold*

1. De l’ insulo, de la verda,
Dum la tempo de la car’,
Naĝas vico da boatoj,
La arme’ de l’ kozakar’.

2. Sur l’unua Sten’ka Razin.
Oni gaja vidas lin.
Feliĉega tiu tago!
Li edziĝis kun princin’.

3. Ŝi mallevas la okulojn.
Kvazaŭ inter viv’ kaj mort’
Ŝi aŭskultas en silento
Al sincera, firma vort’.

4. Liaj viroj tamen grumblas:
“Post nur unu nokto jam
Faris ŝi lin mem virino.
Li perfidas nin pro am’!”

. . .

5. Этот ропот и насмешки
Слышит грозный атаман,
И могучею рукою
Обнял персиянки стан.

6. Брови черные сошлися,
Надвигается гроза.
Буйной кровью налилис
Атамановы глаза.

7. “Ничего не пожалею,
Буйну голову отдам!” —
Раздается голос властный
По окрестным берегам.

8. ”Волга, Волга, мать родная,
Волга, русская река,
Не видала ты подарка
От донского казака!

9. Чтобы не было раздора
Между вольными людьми,
Волга, Волга, мать родная,
На, красавицу возьми!”

10. Мощным взмахом поднимает
Он красавицу княжну
И за борт ее бросает
В набежавшую волну.

. . .

Li la nigrajn brovojn sulkas
Fulmotondro estas li.
En okuloj liaj estas
nun videbla sangebri’.

“Nu fordonu, mi trezoron
la plej belan de l’ amant’!”
sonas lia tondrovoĉo
trans la ondojn al la strand’.

La princino mortpaliĝas
(Timo estas en l’ okul’)
kaj silente aŭdas jenajn
vortojn de la terurul’:

“Volga, Volga, patrineto!
Volga, via estu ŝi!
Ne antaŭe Don-kozakoj
donis tian-ĉi al vi!

Inter liberuloj estu
- Volga, Volga, patrinet’
nek malpaco nek batalo!
Tial - jen la virinet’!“

Kaj li ĵetas la persinon
(la plej karan sur la ter’)
en la bluan profundaĵon,
kaj ŝin glutas la river’.

. . .

................................................
................................................
................................................
................................................

................................................
................................................
................................................
................................................

Plötzlich tönt ein dumpf Gemurre:
Er verrät uns um ein Weib,
|: All der Seinen Glück vergißt er
Um geringen Zeitvertreib. :|

Wolga, Wolga, Mutter Wolga,
Ruhig fließest du dahin,
|: Ahnst nicht, was ein Donkosake
Fürchterliches hat im Sinn. :|

................................................
................................................
................................................
................................................

Vorn als erster Stenka Rasin
Hebt das Weib in wilder Wut, -
|: Wolga, Wolga, nimm ein Opfer!
Und er wirft sie in die Flut. :|

. . .

5. Tion aŭdas kolerante
La kozaka kapitan’.
Kaj li kaptas la princinon,
Per la forta, ega man’.

6. Fulmas la okuloj duraj,
Flame ŝtormas la koler’!
Kaj eksonas lia voĉo
Krudglacie kiel fer’:

7. “Ion ajn, eĉ mian kapon
Ja fordonus mi por vi!
La feliĉon mi ja trovis.
Ĉio estas ŝi por mi!

8. Volga, Volga, kara panjo,
Ho rivera rusa vi!
Kiam vidis vi oferon,
kian nun fordonas mi?

9. Ke neniam ni kverelu
Pro la persa belulin’:
Volga, Volga, kara panjo -
La oferon - prenu ĝin!”

10. Kaj per ambaŭ fortaj manoj,
Dum ektimas la princin’ -
Ve, deborde ŝin li puŝas! -
Kaj la ondoj voras ŝin!

. . .

11. “Что ж вы, братцы, приуныли?
Эй, ты, Филька, черт, пляши!
Грянем песню удалую
На помин ее души!..”

12. Из-за острова на стрежень,
На простор речной волны,
Выплывают расписные
Острогрудые челны.

...

“Nun agordu balalajkojn!
Ludi, danci volas ni!
Estu gajaj, kamaradoj
je la belmemor’ pri ŝi!”

Jen dum kanto, danco, ludo
sur la ondoj de l’ river’
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer’.

...

Und er sieht sie untergehen,
Hört noch ihren Jammerschrei:
|: Stirb als Opfer meiner Treue!
Stenka Rasin, er ist frei. :|

Und die Kähne ziehen weiter,
Und die Kähne ziehen fort,
|: Und die Wolga fließet weiter
Über diesen Schreckensort.

...

11. “Diabloj! Kial vi silentas?
Dancu, kantu ja pro ŝi!
Kaj eksonu la kantado,
La fratara melodi’!”

12. De l’ insulo, de la verda,
Dum la tempo de la car’,
Naĝas vico da boatoj,
La arme’ de l’ kozakar’.

...

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas* Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883).*

*Arg-478-927 (2010-03-07 18:59:55)*

*Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la informojn sub* **`http://ru.wikipedia.org`**, *la ruslingva parto de Wikipedia. Informoj pri la kanto, la melodio kaj diversaj versioj de la kanto estas troveblaj en la retejo* **`http://a-pesni.golosa.info/popular20/izzaostrova.htm`**.

*Traduko de la Rusa poemo "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de* Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883) en Esperanton de* Kristian Langgaard *(∗1894 – †1957).*

*Arg-478-1036 (2010-03-08 21:19:37)*

*Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiun ĉi esperantigon el la reta kolekto "http://www.esperantonia.dk". kiun kunmetis s-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK4640 Fakse, Danio,* **`lars.kromann@mail.dk`**). *Vidu la retejon* **`http://www.esperantonia.dk/volga.htm`**. *Kristian Langgaard estis dana Esperantista verkisto kaj Esperanto-instruisto. Vidu ekzemple:* **`http://www.esperantonia.dk/lingvaj.htm`**. *Pri lia vivo kaj verko vidu ankaŭ la artikolon* **`http://www.esperantonia.dk/bio-langgaard.htm`**.

*Traduko de la Rusa poemo "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de* Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883) en la Germanan de N. N. 21.*

*Arg-478-1038 (2010-03-09 15:31:43)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi germanigon de la kanto en* **`http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/stenkara.html`**. *Latinskriba aliskribo kaj laŭvorta germanigo troveblas en* **`http://www.kaikracht.de/balalaika/songs/izza_bal.htm`**. *Vidu ankaŭ la vikipedian retejon* **`http://de.wikipedia.org/wiki/Stenka_Rasin`**.

*Traduko de la Rusa poemo "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de* Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-478-928 (2009-10-30 16:18:33)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-10-09 tiun ĉi Esperantigon de la konata rusa kanto de s-ano Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim), dum kunveno de la Munkena Esperanto-grupo.*